I. F. E. A.

ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI
Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I. F. E. F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U. E. A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F. E. I.)
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italujo)

ESPERANTO

# Informa Bulteno

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071 REDAKTORO: Gimelli p. i. Germano

N° 3 - 4 Marto kaj Aprilo 1961 11-a Jaro

## LA 13-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO - KONGRESO

BARCELONO, Hispanio, 6 ĝis 11 majo 1961 - Kongresejo: Casino del Parque de la Ciudadela
Adreso: 13-a I.F.E.F.-Kongreso, Estaciòn Termino R.E.N.F.E. BARCELONO (Hispanio)
Protektata de la Sindikata Fako "Educaciòn y Descanso".

ĜENERALAJ INFORMOJ INFORMILO N-ro 3

Informejo: En la stacidomo Termino ĝi funkcios dum vendredo la 5-a de majo kaj dum sabato la 6-a de majo de la oka matene ĝis la naŭa vespere. Ankaŭ dum la samaj tagoj funkcios en la stacidomo Port Bou ĉe la landlimo informejo. La akceptejo troviĝas en la kongresejo, kiu situas je kvarminuta distanco de la stacidomo.

Tombolo: Same kiel en aliaj I.F.E.F.-kongresoj, L.K.K. aranĝos tombolon dum la kongreso Gekongresanoj kunportu tipajn donacojn de via lando. La profito estas por nia bulteno "La Internacia Fervojisto".

Loĝado: La rezervigmono (100 pesetoj) estos enkalkulata en via pago por via loĝejo.

Fervoja Bileto: La plej rekta vojo por atingi Barcelonon estas tra la landlimo Cerbere-Port Bou. Por la kongresanoj kiuj ne rajtas vojaĝi senpage per hispanaj fervojoj, oni anoncas ke la distanco de la landlimo ĝis Barcelono estas 168 km. La prezoj estas la jenaj: 1-a kl. 157; 2-a kl. 115 ptoj; 3-a kl. 72 ptoj. Pri ĉi tiuj prezoj L.K.K. klopodos akiri rabaton.

Informazioni per gli Italiani: La carovana italiana partirà da Bologna in vettura riservata il giorno 5 maggio alle ore 6,18; raccoglierà i partecipanti a Modena (ore 6,42), a La Spezia (ore 9,40) ed a Genova (arrivo ore 11,25 partenza ore 15,20) per giungere a Port Bou il giorno seguente 6 maggio alle ore 7,05. Si partirà da Port Bou, in vettura normale poichè la nostra vettura non può proseguire, alle ore 8,15 per giungere a Barcellona alle ore 11,55.

## LA 46-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

HARROGATE (Britujo), 5 - 12 Aŭgusto 1961 - Korespondadreso: 46-a Universala Kongreso de Esperanto-Harrogate. Telefono: Harrogate 4685. Telegrafo: Esperanto Harrogate
Oficiala Antaŭkongreso kaj Seminario "Oriento-Okcidento" (Londono, 2-4 Aŭgusto 1961): S-ro Victor Sadler, 1 Poet's Road, Highbury, Londono n. 5.
17-a T.E.J.O.-Kongreso (12-19 Aŭgusto 1961): S-ro T.G. Page, 90 Ross Street, Cambridge.

OFICIALA KOMUNIKO

Prospekto pri Harrogate: La Urbo Harrogate decidis eldoni en Esperanto plurkoloran turisman prospekton. Interesitoj povas mendi la prospekton ĉe la Kongresa Oficejo, aldonante unu respondkuponon por la afrankkostoj.

Cseh-Seminario: La Internacia Cseh-Seminario okazos en Harrogate dum la Kongresa semajno. Ĝi daŭros 15 horojn. Kotizo: 32 steloj, pageblaj ĉe la Internacia Esperanto-Instituto, Riowstraat 172, Hago, aŭ (por britoj) ĉe S-ro H. Holmes, London E. 11.

Prospektoj en Esperanto: La Kongresa Komitato estas preta eldoni turismajn prospektojn en Esperanto al la kongresaj dokumentoj. Alsendoj devas esti antaŭe interkonsentitaj kun la Kongresa Oficejo en Harrogate.

G.C. FIGHIERA - Konstanta Kongresa Sekretario

## 5° CONVEGNO REGIONALE VENETO
### 2 Giugno 1961 - VICENZA

In occasione del cinquantenario della sua fondazione il Gruppo Esperantista di Vicenza, organizza il 2 giugno 1961, il 5° Convegno Regionale Veneto col seguente:

PROGRAMMA:

ore 8 - 9,30 - Ricevimento ospiti (Esperanto servo ĉe Stacidomo F.S.)
" 9,45 - Apertura mostra-rassegna Esperantista
" 10,30 - Solenne Apertura V° CONVEGNO REGIONALE
"50 anni di attività esperantista Vicentina" (relatore G. Franzina)
" 12 - Ricevimento ospiti a Palazzo Trissino (Municipio) ore 13 Pranzo
" 15 - Ripresa dei lavori e presentazione oratori (relatore Attilio Liotto)
- ATTUALITA' DELL'ESPERANTO (Relatore Prof. Carlo Agostini)
- L'ESPERANTO AL SERVIZIO DELL'UNITA' EUROPEA (Rel. Prof. Dino Fabris)
" 17,30 - Visita al Teatro Olimpico, alla Rotonda Palladiana e al Santuario di Monte Berico. Ore 22 Vhiusura della Mostra-rassegna Esperantista.

## UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO KANDIDATO POR LA NOBEL - PACPREMIO 1961

Multaj altekvalifikitaj personoj en 17 landoj proponis U.E.A. (Universala Esperanto-Asocio) kiel kandidaton por la Nobel Pacpremio 1961. Senkonsidere al la fina decido, tiu fakto per si mem montras la respekton, kiun hodiaŭ la Asocio en la ekstera mondo kaj certe tiu plia ŝigno de la daŭre altiĝanta reputacio de U.E.A. kontribuos al ĝia plua interna fortikiĝo.

## NIAJN GRATULOJN

La Ĝenerala Sekretario de T.E.J.O. (Tutmonda Esperantā Junulara Organizo), Nicola MINNAJA, lastatempe doktoriĝis "SUMMA CUM LAUDE" en la aĝo de 22 jaroj. D-ro MINNAJA, kiu interalie estas ankaŭ Komitatano de U.E.A., estas denaska esperantisto, kaj plurfoje premiiĝis en niaj Oratoraj Konkursoj. Al D-ro MINNAJA nian koran kaj varman gratulon.

## POLA RADIO ESPERANTAJ DISAŬDIGOJ VARSOVIO POLLANDO

### GRANDA SPORTA KONKURSO DE LA POLA RADIO

Laŭ la tradicio de la antaŭaj jaroj, ankaŭ en la nuna jaro la Pola Radio organizas por siaj aŭskultantoj loĝantaj eksterlande Sportan Konkurson okaze de Internacia Biciklista Pac-Konkuro Varsovio-Berlino-Prago, kiu okazos ekde la 2-a ĝis la 16-a de majo en la nuna jaro. La Konkuro komenciĝos la 2-an de majo en Varsovio, kaj finiĝos la 16-an de majo en Prago. La konkursaj demandoj estas jenaj:

1) Kiu nacia teamo venkos en la kolektiva klasigo?
2) Divenu la nacieco n de la individua venkinto en la konkuro.

Inter partoprenantoj de la konkurso, kiuj alsendos ĝustajn respondojn, estos lotumitaj multaj valoraj premioj, interalie senpagaj ekskursoj al Pollando por 10-taga estado kune kun senpaga ambaŭdirekta trajn- aŭ flugvojaĝo, fotoaparatoj, radioricevilo j, aliaj atrakciaj produktoj de la pola industrio, metiaro kaj popolarto, interesaj libroj Ktp.

Respondojn al la demandoj oni devas sendi sur poŝtkartoj ĝis la 7-a de majo inkluzive laŭ jena adreso: Pola Radio, Varsovio, Pollando, kun klarigoj "Sporta Konkurso". La partoprenantoj de la konkurso estas petataj precize kaj legeble skribi siajn adresojn.

Ni atentigas, ke en aprilo, en la brodkastoj de la Pola Radio, estos komunikataj informoj koncernantaj la teamojn kaj unuopajn biciklistojn startontajn en la Konkuro, kaj en majo ĉiutagaj raportoj pri laŭvicaj etapoj.

PAROLAS VARSOVIO... PROGRAMO DE LA ELSENDOJ EN ESPERANTO ĜIS SEPTEMBRO 1961

Radio Varsovio disaŭdigas ĉiutage de la h. 16,30 ĝis la h. 17 laŭ la mezeŭropa tempo duonhoran programon en Esperanto sur jenaj ondoj: 25,09 m.(11955 kc/s); 25,28 m.(11865 kc/s); 25,42 m.(11800 kc/s); 31,01 m.(9675 kc/s); 31,45 m.(9540 kc/s); 31,50 m.(9525 kc/s); 42,11 m.(7125 kc/s) kaj sur la meza 249 m.(1205 kc/s).